DISTANCE INSTRUI EN AFRIKO

LA IDEO

Okazis, ke en U.E.C., universitato Espoir en Kongolando (DRK), aperis peto de la Rektoro, Elisée BYELONGO, por oficiala instruado de Esperanto. D-ro Renato CORSETTI transdonis al mi lian peton.
Ĉar mi ne loĝas en Baraka, urbo de tiu universitato, mi proponis distancan kurson, kaj mi kreas ĝin kaj evoluigas ĝin paŝo post paŝo.

LA CELOJ

Mi fakte nur estas la homo, kiu kapablis realigi tiun defion. Profesia speciala instruistino por infanoj kun malfacilaĵoj, mi kapablis elpensi sistemon por instruis en specialaj kondiĉoj al homoj kun diversaj edukaj fonoj. Mia celo estas tre baza: konservi ilin en la kurso, ke ili ne forturnu sin de la strebo al lernado.
Necesas krei ŝtupetojn, por ke ili ricevu rekompencojn kaj mem-gratifikojn.

Afrikanoj sopiras pri frateca ideologio, ili bezonas senti sin agnoskataj kaj akceptataj en la homaro, malgraŭ la geopolitika monda situacio. Ilin ne allogas esti poliglotoj, fakte ili jam estas.
Necesis krei ne nur universitatan distancan kurson, sed tutan komunumon de grupoj.

Tiel kreiĝis la *fakultato pri lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko* kun Renato CORSETTI kiel direktoro kaj Aĥmad Mamduhi kiel ĉefa helpanto, prezidanto de ILEI.

La tuto estas komuna projekto de UEC, UEA (vikia retejo de UEA, kie la organizado, konservado de prezent-dosieroj kaj informado okazas) kaj ILEI (kursoj de EToSO-projekto ; eldonado de kursoj en la jutuba retejo de ILEI.)

La rektoro mem ne implikiĝas en la projekto, krom aludo pri Esperanto en tiu freŝa artikolo, en oktobro 2024.

https://www.eurasiareview.com/27102024-the-challenges-of-managing-an-educational-institution-of-higher-learning-basic-principles-and-approach-interview/

LA EFEKTIVIGOJ

Mi kreis kurson kaj mi komencis instrui Esperanton por komencantoj per Zomo (Zoom) en januaro 2022, nur por studentoj de UEC en Baraka. Sed estis malstabila retkonekto ĉe la afrikanoj kaj ĉe mi, kaj malfacila kontrolo de la sennomaj ĉeestantoj (plurope

spektantaj unu telefon-ekranon) kaj ne ebla takso de iliaj progresoj. En UEC mankis, por grupa instruado, lernoĉambro, granda ekrano kaj vifio.

Do la duan jaron, mi utiligis Vacapon, kiu estas la plej populara ap(likaĵ)o (programeto). Kaj la aliĝantoj venis pli kaj pli de aliaj afrikaj landoj. La instruado fariĝis individua kaj mi ekuzis jam pretan kurson kiun mi adaptis kaj modernigis laŭ didaktikaj postuloj. Mi dividis ĝin en 10 serioj kun 10 finaj skribaj ekzamenoj.

LA KONKRETA FUNKCIADO

Konkrete, mi registras en UEC la lernontojn, kiuj alvenas per Vacapo kaj mi proponas al ili lerni Esperanton en mia kursaro. Mi taksas, ilin, kaj laŭ ilia preferata lingvo proponas al ili instruiston kaj mi metas ilin en ties virtualan klason, grupo en Vacapo.
Efektive, nun estas la 4-a jaro, kaj la organizo konstante evoluadas.
Hodiaŭ estas ĉirkaŭ 450 lernantojn en 3 grandaj vacapaj grupoj (niveloj 1, 2 kaj 3) kaj el inter ilin pli ol 150 studentoj regule progresas en siaj lecionetoj, grimpante de klasgrupo al klasgrupo.

LA UNIVERSITATA KADRO

- daŭro: lernojaro de septembro ĝis junio,
- registro: listo de ĉiuj registritaj gestudentoj kun kontaktaj detaloj (ekz. parolataj lingvoj),
- instruistoj: krom mi, nun estas teamo de 15 aliaj instruistoj, volontuloj kiel mi.
- klasgrupoj: Por la unua duono de la programo, ĉiu serio de 10 lecionoj kun sia fina skriba testo konsistigas apartan klas-grupon kun aparta instruisto. Ekde la leciono 71 ĝis la fino (leciono 100 kaj testo n° 10) mi instruas. Ekzistas ankaŭ apartaj klas-grupoj por instruado per la angla kaj per la svahila, kaj apartaj instruadoj por homoj kun apartaj bezonoj aŭ handikapo, kaj parol-metoda grupo kun 3 niveloj.
- parolaj ekzamenoj: fine de februaro kaj fine de junio, per video-kunsido antaŭ internacia ĵurio (prezidanto de ILEI, direktoro de la fakultato pri lingvoj en UEC, foje ankaŭ fakulino pri ekzamenoj de ILEI, foje ankaŭ la rektoro),
- kosto: senpagaj kurso kaj diplomo, sed sen mencio kaj sen emblemo de la universitato UEC (aparte pagenda, 15 €).

  Necesas ne nur havi kurson kaj instrui ĝin. Necesas krei strukturon por enkadrigi la instruadon. La lernontoj, unuavide, ne konsideras Vacapon serioza kaj kleriga.
  Instrua strukturo estu montrebla kaj videbla, des pli ke la instruisto kaj la studento estas nevideblaj. Necesas klaraj ŝtupetoj por evidentigi la progresojn kaj kreskigi la motivon.

LA KURSO KUN 100 LECIONOJ KAJ 10 TESTOJ

La instruado okazas per la franca, laŭ la origina postulo de la Rektoro de UEC.
Unue, antaŭ la kurso mem, estas grupoj por lerni la alfabeton, la sonojn, silabojn, akcenton, literumadon.
Poste venas du grupoj por lerni la dek unuajn lecionojn ĝis la testo 1. Sekve la serioj de po 10 lecionoj, kun multe da helpmaterialo. Mi kreis testojn, kiujn la studentoj faru skribe en Vacapo.

La metodo estas RIGORA KAJ PRECIZA:

- Instruisto sendas unuopan lecionon.
- Ĉiu leciono finiĝas per solvenda tasko.
- Studento respondas en malsama tempo.
- La instruisto ne donas respondon, nur helpas.
- La studento devas mem korekti sin.
- Tiam la instruisto sendas la sekvan lecionon.

Post la 10-a leciono venas testo kun 10 demandoj. Ĉiu demando de la testo havas numeron kaj tiu numero rilatas al la samnumera leciono.
La studento ripetas la necesajn lecionojn (ĉiun lecionon kun la numero, pri kiu li fiaskis en la testo.)
La studento ripetas la teston por plibonigi sian rezulton.
Fine de tiu dua etapo, la instruisto donas la finan noton por la testo.
Povas esti tria etapo aŭ plena ripeto de la tuta serio (se okazis longa paŭzo.)

LA DEFIO DE DISTANCA INSTRUADO

Utiligi Vacapon anstataŭ Zomon ebligas individuan rilaton kaj kontrolon de ĉiu lernanto.
Ekz., alveninte en sian virtualan klason, necesas sin prezenti.
Tamen malfacilas postuli regulan respondadon al la lecionoj:

- komputiloj kaj utiligo de retadresoj ne estas oftaj,
- alta prezo de la retkonekto por ĉeesti longan kurson (necesas aĉeti “datumojn” antaŭe), do longaj retaj video-lecionoj tro multekostus,
- ne regula disponebleco de loko kun retaliro (en urbo, ne en la kamparo), malforta kaj malregula signalo, neniu ekrano por grupa spektado, eĉ en universitato,
- ne regula ŝargo de la telefono pro longaj elektraj interrompoj,
- neplanado de la laborhoroj kaj malregulaj vivnecesaj enspezoj,
- oftaj teruraj okazaĵoj (malsanoj, akcidentoj, forpasoj, incendioj, inundoj, milit-embuskoj…)
- oftaj funebroj
- bezono labori sur kampoj aŭ lastmomente “serĉi monon”...
- Por veki kaj kuraĝigi niajn studentojn, ni povas memorigi al ili, ke fine de junio aŭ komence de julio okazos parol-ekzameno per Zomo (Zoom) kun diplomo.

KIAL VACAPO?

Distanca kurso evitas temporabajn kaj poluajn veturadojn kaj ebligas lernadon al vilaĝanoj. En Afriko, Vacapo jam estas en ĉies poŝtelefonoj, dum ne ĉiuj havas retadreson.
Vacapo ebligas telefoni, sendi voĉajn tuj-mesaĝojn, tekstajn tuj-mesaĝojn. Mi eĉ povas krei enketilon, por povi krei subgrupojn laŭ la nivelo. Eblas sendi klarigajn bildojn eĉ pli belaspektajn ol kiam oni skribadas sur tabulo.

VACAPO ESTAS MALRIGIDA
La respondo ne okazas samtempe, do la instruisto kaj la studento povas resti en rilato malgraŭ la elektraj paneoj, la manko de datumoj por Interreto, ĉiaj obstakloj rilataj al tempo-planado kaj subitaj urĝaĵoj. Tio glatigas la komunikadon, ĉar ambaŭ, la instruisto kaj la studento, pli flue komunikas inter si, sen tempo-premo.

SED ESTAS DU MALFACILAĴOJ
- La prezo de moderna retalira telefono kun tuŝ-ekrano,
- Sufiĉa memor-spaco, por ke la studento konservu la lecionojn, ĉefe pezajn dokumentojn pdf.

TAMEN VACAPO KONGRUAS KUN
- Paroliga kurso
- Soci-komunika metodo: la instruisto parolu dulingve pri ĉiaj organizaj informoj, ne temas nur pri fikciaj situacioj,
- Izolitaj komencantoj: en grupoj, ĉiuj povas legi mesaĝojn de ĉiuj, kaj ek-rilati unuj kun la aliaj,
- Amasa instruado: eblas organizi komunumon kun grupoj (por ĉiuj klasoj) kaj kanalon (por dissendi informojn al ĉiuj).

LA KOMUNUMO EN VACAPO

Strukturo de la “komunumo”:
- Mi kreis komunumon por la kurso **kadre de UEC**, tiu komunuma enhavas nun pli ol 20 grupojn. En la komunumo por nia kurso kadre de UEC ekzistas 1 kanalo, en kiu mi dissendas informojn, 20 grupoj, el inter ili 10 klasgrupoj por la 10 serioj da lecionoj, kaj grupo por instruistoj, kaj grupo por prepari la parol-ekzamenon, parolmetoda grupo, du grupoj en la svahila, unu duobla grupo en la angla, unu (aktuale malplena) en la runda.
- Estas ankaŭ pli kaj pli da lokaj grupoj, por ke esperantistoj de diversaj regionoj de Kongolando konatiĝu. Kiam mi registras iun, mi povas tuj proponi eniri en lokan grupon.
- Ĉiu instruisto en mia teamo zorgas pri tuta serio de 10 lecionoj kaj pri ties fina testo, kaj raportas al mi pri ĉies unuopa progreso.

La 3 grandaj grupoj en Vacapo

- Apude, mi kreis tri grandajn grupojn por afrikanoj **ne registritaj en UEC,** sed al kiuj mi sendas konsilojn pri la lingvo kaj movadajn informojn.
- Estas, gramatikaj lecionetoj, leksikaj atentigoj, prilingvaj instruaj bildoj, ekzercoj aŭ kompletan kursoj en pdf-formato, kiun oni povas elŝuti, ligiloj, programeto por sia telefono k.s.
- Tiuj 3 grandaj grupoj havas 3 nivelojn, tiel ke en la unua oni parolas preskaŭ nur france (sed tie la komencantoj restu teorie nur 3 semajnojn.)
- Tiuj grupoj nepras, ĉar distancaj lernantoj bezonas ekzercadon, alian materialon, libron, programeton (telefonan apon), korespondadon, ekscii pri ĉeesta grupo, aŭ pri projekto, celo…
- Tie oni interŝanĝas ligilojn kaj afrikajn informojn pri la loka movado.
- Eblas serĉi en la arĥivoj de la grupo.

Aliaj situacioj por interrilati:

- invito al la fonetika trejna grupo (kiun mi kreis antaŭ jaroj en Telegramo),
- printindaj kursoj por legi kaj lerni,
- veraj soci-komunikaj situacioj (por klarigi ion voĉe per Vacapo, ĝenerale dulingve.)

LA REGISTRO KAJ LA AKCEPTO

La registro estas aparta konfidenca dokumento, listo ekster Vacapo kun la precizaj kontaktinformoj donitaj de ĉiu, inkluzive kun la jam posedataj lingvoj kaj la promeso lerni po tri lecionojn semajne.
Post mia akcepto venas sendo de informoj kaj akcepto en grupoj. La unua klasgrupo koncernas la lernadon de alfabeto kaj la elparolon de ĉiuj literoj, ĝi havas sian propran instruiston. Post ĝi venas la klasgrupo por la unuaj lecionoj kun alia instruisto.

LA INSTRUISTA TEAMO

Nun volontulas kun mi pluraj help-instruistoj: François, Gadoufia, Hassan, (Espoir kaj Jacques, ne plu) Love, Serĝo, Victor, Sergio Ch, Sinarinzi, Jean Dedieu, Nestor, A. Messan, Daniel, Lafi, Miora, Alexandrine, Eloi. Ili ĉiuj estas francparolantaj afrikanoj krom unu kolombiano kiu perfekte regas la francan. Ili ĉiuj mem pagas siajn elspezojn pro la retaliro necesa por sia volontulado.
Kun 450 homoj en tri grandaj grupoj, kaj el inter ili 150 registritoj por la individua distanca kurso, tio estis necesa.
La Vacapa grupo por instruistoj:

- volontuloj kaj finlernintoj kiuj jam regas tiun metodon povas fariĝi help-instruistoj
- ekzistas aparta Vacapa grupo por nia instruista teamo, kie mi donas konsilojn. Mi daŭre provizas ilin per metodologiaj kaj didaktikaj konsiloj, diskonigas mian kolekton de instrua helpmaterialo, dankas kaj gratulas ĉiun semajnon okaze de mia semajna raporto.

Jen tabelo pri la junia situacio:



Klare videblas, ke abundo da studentoj komencas lerni, kaj post 30 lecionoj nur deko da ili plu lernas. La tri unuaj klasgrupoj perdas trionon de siaj gelernantoj.
Pro tio, ĉijare ne plu estas grandaj grupoj kun po 20 kursanoj, sed maksimume 7 membroj en ĉiu virtuala klaso. Kaj mi ĉiusemajne persone skribas al ĉiu, kaj foje "fliki" la rilaton kun la instruisto.

LA PRINCIPOJ DE MIA METODO

- La instruistoj sendas la lecionojn unu post la alia. La studento devas respondi al tri lecionoj ĉiun semajnon. La unuan tagon, la instruisto kontrolas la respondon, la duan tagon, la studento proponas pli bonan respondon. Ili ĉiuj akceptis la kadron: unu leciono daŭru 2 tagojn, kaj oni redonu 3 taskojn en la semajno. Tiel 33 semajnoj x 3 lecionoj = 100 leciona kurso kompletigita!
- La kurso mem estas adaptaĵo de la kurso de *La teamo de Esperanto Argentina*. Mi korektis lingvajn eraretojn, gramatikajn kaj leksikajn, plimodernigis kelkajn temojn kaj forigis fantaziaĵojn, enmetis pli da dialogoj pri ĉiutagaj verŝajnaj situacioj, mi emfazis oftecon de la vortoj, verbojn kaj demando-frazojn.

- La instruistoj, ne ĉiuj sed pluraj, organizas telefonan rendevuon unufoje monate, kun sia grupo. Video-alvoko per Vacapo ne eblus, sed voĉa telefonado eblas ĝis ok partoprenantoj, kaj niaj virtualaj klasoj ne superas 7 membrojn plus la instruisto. Tiuj kunvenoj plifortigas la rilaton kun la instruisto kaj la emon respondi, kiam li iam petos, ke oni redonu sian taskon…
- Instruaj principoj: la instruistoj ne donu la respondojn sed nur indikojn, por ke studento povu korekti sin mem. Mi kunhavigas en mia nubo apartan instruan materialon laŭ la niveloj, kun disponeblaj multaj bild-lecionetoj pri apartaj gramatikaĵoj, por helpi tiujn studentojn, kiuj preferas vidan bildon al voĉa aŭda klarigo. Enestas ankaŭ informiloj por motivi eklernadon, helpiloj por instrui el la angla aŭ por blinduloj, kaj pretaj kompletaj kursetoj kun korektoj por memlernantoj.
- Tiel la gramatiko estas instruata individue kaj laŭ rigora progreso, dum la socikomunikaj situacioj nature okazas en la grandaj grupoj, kie mi diskonigas movadajn novaĵojn kaj kulturajn interesaĵojn (la grupoj "Afriko 1, Afriko 2 kaj Afriko 3).
- La parolmetoda grupo disponigas ĉiutage tri novajn taskojn: 1. ripeto de frazoj aŭskultotaj en filmeto per Jutubo, 2. laŭtlegado de konversaciaj frazoj, 3. rakontado per kelkaj frazoj (laŭ la temo de la tago.)

LA SKRIBAJ TESTOJ

La testoj okazas same per Vacapo, temas pri 10 demandoj, plej ofte korektindaj frazoj kaj malofte da tradukaĵoj por eviti friponadon per Guglo-tradukilo (Google Translate).
Ĉiu demando rilatas al la sam-numera leciono, ekz., se studento eraras en la demando 32, necesos resendi la lecionon 32 por repaso. Ĉiu demando koncernas la ĉefan gramatikaĵon de la samnumera leciono.
Post la repaso de la malfortaj lecionoj, oni rajtas reprovi sian teston, kaj tiam la instruisto donas noton.
Tion ni nomas "la du etapoj de la testo".

La testoj ne nur venas post tuta serio de 10 lecionoj. Ili ankaŭ utilas por taksi komencintojn, kiuj deziras eklerni en nia kurso, do kiel diagnozaj taksoj.



Klare videblas, ke estas abundo da komencantoj kaj tre malmulte da studentoj, kiuj lernas ĝis la fino de la kurso. Konsekvence, ankoraŭ malpli da ili prezentas sin al la parola ekzameno.
Tio ŝanĝiĝos ekde februaro 2025 pro akcepto de la lernantoj en la Parolmetoda grupo. Eĉ tiuj, kiuj ne komprenas abstraktajn gramatikajn kategoriojn, sed kiuj flue parolas Esperanton, rajtos prezenti sin al la parol-ekzamenoj. Unuan fojon, laŭ mia scio, analfabetoj ekzameniĝos pri Esperanto, diris Renato Corsetti.

LA TABELO DE PROGRESOJ

La instruistoj de la teamo raportas al mi pri la finsolvitaj lecionoj kaj testoj kaj mi enskribas ties numerojn en la tabelo.
La tabelo estas ekster Vacapo. En tiu tabelo estas ĉiuj nomoj kruce kun semajnoj, kaj en la ĉeloj estas informoj pri ĉies progresoj.
La tabelo helpas por vidi tiujn studentojn, kiuj ne respondis jam de kelkaj semajnoj, kaj "veki" ilin.
Ĉiu instruisto havas propran koloron kaj ĉiuj liaj gekursanoj havas la saman koloron kiel li, tiel facilas vidi kiuj klas-grupoj lamas.
Eblas unuavide rimarki tiujn, kiuj restas pli ol kvar semajnoj en la sama klas-grupo.

Ĉar unu serio enhavas 10 lecionojn = du etapoj por la testo, tio estas 12 taskoj. Kaj oni redonu po tri taskojn semajne, do 12 / 3 = 4 semajnoj.

LA PAROL-EKZAMENOJ

Mi organizas du parol-ekzamenojn jare, en februaro kaj en julio. Ili okazas per Zomo (Zoom), do necesas prepari kelkajn studentojn al tiu ilo. La ĵurio konsistas el la direktoro de la fakultato kaj la prezidanto de ILEI. Por tiuj, kiuj ne povas utiligi Zomon, mi montras la ekranon de mia telefono, kun la vizaĝo de la kandidato sur la ekrano, al la kamerao de Zomo en mia komputilo.
La kondiĉoj por prezenti sin antaŭ la ĵurio estas:

- ☐ Esti registrita studento en UEC.
- ☐ Esti kapabla kompreni kaj respondi.
- ☐ Esti trapasinta skribajn testojn.
  Tiu tria kondiĉo malaperos pro nia akcepto de ne longe instruitaj kandidatoj. Tamen estos mencio sur la atestiloj.

La diplomoj
La diplomoj estas atestiloj de ILEI. Estas tri eblaj mencioj en la du niveloj, elementa kaj meza.
Eblas akiri emblemon de UEC sur la atestilo, sed tio estas aparte pagenda al la universitato de la rektoro Elisée Byelongo (per 15 € al lia UEA-konto).

KONSILOJ POR INSTRUI PER VACAPO

- Vacapo ebligas serĉadon en la mesaĝa kesto, por trovi en kiu leciono unue aperis kiu nocio (sur komputila ekrano estas eĉ lupeo).
- Eblas tajpi per nigraj dikaj literoj, aŭ kursive, kaj eblas forstreki parton de frazo aŭ vorto,
- Eblas kapti ekrankopion de parto de la leciono kaj fluoreske surmarki atentigan detalon, kaj sendi ĝin kiel bildon,
- Eblas prepari por si mem, kaj sendi al sia propra nomo en Vacapo, pretajn voĉajn klarigojn, kaj tiel kolekti tutpretajn mesaĝojn kiuj utilos por pli poste sendi al unuopaj studentoj.
- Eblas prepari kelkajn kolorajn reagojn, per aliaj klavaroj:
  👀🅡🅔🅛🅔🅖🅤 👀
  ≡⭐GRATULON⭐
  🎉Vi atingis la teston !🎉
  🌺🅙🅔🅢!🌺

<u>Kelkaj konsiloj al miaj helpinstruistoj:</u>

- *Kion fari, kiam iu ne trovas la solvon?* 🤔

- En la okazo, kiam instruisto devis doni la respondon, tiam li elpensu novan tradukotan frazon, similan al tiu frazo kiu ne estis solvita de la studento. Kaj la studento devos solvi tiun novan frazon antaŭ ol rajti ricevi la sekvan lecionon. 🤗

Ni instruas Fundamentan Esperanton, atentante pri la konsiloj de la Akademio.
Ni ne akceptas en la respondoj al la lecionoj erarojn de finaĵoj, de interpunkcio, de uskleco, de ortografio kaj de supersignoj.
Ni instruas en universitata kadro, do la skriba lingvo estu taŭga por redaktado de oficialaj dokumentoj, kiel raporto, projekto aŭ subvenci-peto.

Ekz. pri la uzo de "x", tre komuna en sociaj retoj, anstataŭ "^". Mi regule proponas ligilojn al Esperantaj klavaroj por ĉiaj mastrumsistemoj, kaj mi atentigas, ke okaze de uzo de alia telefono aŭ de publika komputilo, la sola permesita surogata litero estas "h". Ĉar multaj afrikanoj lernas Esperanton en grandaj klasoj, kun parolanta instruisto, kaj do ili malpli regas la skriban lingvon ol la parolan.

Jen utila lertaĵo por pli rapide tajpi: dikti mesaĝon en Esperanto
Por pli rapide labori per Vacapo, eblas voĉe eldiri sian tekston.
Kõnele estas klavaro por Esperanto Parolrekono, alia apo.
Tio funkcias kiel surekrana klavaro (IME).
Tie, kie necesas skribi mesaĝon aŭ serĉon, en teksto-kesto aŭ teksto-kampo, vi elektu Kõnele kvazaŭ alian klavaron, kaj VI PAROLU!

KONKLUDE

Jam centoj da afrikanoj lernis en nia serioza kurso, kvankam senpaga kaj okazanta distance per populara telefona programeto.
Sen forgesi la helpinstruistojn, progresantoj kiuj kleriĝis kaj maturiĝis, kaj kapabliĝis pri strukturita distanca lingva instruado.